

ISSN 2072-5825

Espero Katolika



Numero 7-9/2009

Julio-Septembro 2009

Sur la kovrilo: *La nekoruptita korpo de sankta Johano Maria Vianney, en la pilgrimloko al li dediĉita en Ars. En la 150a datreveno de lia morto soleniĝas la Jaro de la Pastreco (v. p. 100-105).*

ENHAVO

ENKONDUKE - Letero el la estonteco 99

LA JARO DE LA PASTRECO 2009-2010

“Por esti paŝtistoj laŭ la Koro de Dio”

Letero de Benedikto la 16a al ĉiuj pastroj 100

SANKTA JOHANO MARIA VIANNEY

Biografio de la sankta pastro de Ars 102

“CARITAS IN VERITATE”: la 3a Encikliko de Benedikto la 16a

Ĝenerala trarigardo pri la enhavo 106

La unua kaj dua ĉapitroj 107

La tria kaj kvara ĉapitroj 108

La kvina ĉapitro 110

La sesa kaj lasta ĉapitro 111

MOVADE 112

FUNEBRE 114

FONDAĴO “EVIDENTE” INFORMAS (julio 2009) 115

Radio Vatikana, 114 - Landaj Rezentantoj, 116

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Honora Prezidanto:** Sac. Duilio Magnani - **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

ENKONDUKE – Letero el la estonteco

Karegaj!

Ĉi tiu numero estis presita januare de 2011. Vi ĝin ricevas kune kun alia numero, la lasta de 2010; per la kunsendo de du numeroj (unu malnova, unu nova), mi planas reordigi la aperdaton de nia revuo. Ne eblas “salti” la publikigojn, ne nur ĉar la jura registrado de la revuo malvalidiĝus, sed ĉefe ĉar abonantoj rajtas je la servo. Mi esprimas mian dankemon al ĉiuj Vi, kiuj konservis “paciencon” kaj mi pardonpetas pro la misa servo, kiu – mi ankoraŭfoje diras - ne ŝuldiĝas al ia seniluziigo aŭ manko de sindediĉo. Detale: al la motivoj de la neapero de EK dum monatoj kaj monatoj, priskribitaj en n-ro 4-6/2009 (cetere, ripetigis kolapso de komputilo kaj kelkaj etaj sanstataj problemoj miaj) lastatempe aldoniĝis la streĉa laboro en kiu mi partoprenis kun la Estraro por la realigo de la jubilea Kongreso en Parizo kaj por la ŝanĝo de la IKUE-statuto – kiel decidis la ĝenerala Kunveno 2010. La laboro ĉe RV des pli kreskis, ĉar nun la jaŭdaj elsendoj ne plu konsistas el felietonaj tekstoj, antaŭpretigitaj kaj surbendigitaj sinsekve per unu sola deĵoro, sed el aktualaĵoj, kiujn oni devas redakti kaj surbendigi ĝustatempe, ĉiusemajne. Ne mankis (nek mankas) la plenumo de diversaspekaj, improviziaj petoj el la movado, kiuj ofte, pro sia urĝeco, forrabas multe da tempo.

La revuo do ne povis “ĉeesti” por informi aktuale pri la gravegaj eventoj de la periodo 2009-2010. Inter ili estas la plej drasta bato por IKUE nunepoke: la forpaso de pastro Duilio Magnani, okazinta la 20an de aprilo 2010. Ĉi tiu dolora sciigo reĥis amase en la interreto kaj en la esperantistaj revuoj kaj elsendoj. EK honorigos lin per speciala



numero, bedaŭrinde malfrue.

Mi spertas egan kortuŝigon enpaĝigante liajn tekstojn kaj mesaĝojn por la realigo de la EK-numeroj de 2009, kiam pastro Duilio

ankoraŭ estis meze de ni kaj daŭrigis sian intensan agadon, malgraŭ malsano. Mi certas, ke tamen mi devas elteni la emocion kaj publikigi ĉion, por ke lia mesaĝo restu konata kaj konservata. Verŝajne, reaŭskulti lian ateston hodiaŭ, kiam ni scias ke li iris al la domo de la Patro, pli bone komprenigos al ni la humanecon de nia kara pastro kaj des pli gustumigos al ni lian figuron.

Karegaj gefratoj, Vi rimarkas ke ĉi tiu numero estas 20-paĝa. Kial? Ĉar je la horizonto estas alta kresko de poŝtaj tarifoj: ili preskaŭ duobliĝos (por sendi 100-graman revunumeron al Eŭropo oni ne plu pagos 1,70 eŭrojn, sed 3,00!). La budĝeto de IKUE ne povas elteni tian kreskon, tial ĉiu revu-numero devas pezi maksimume 50 gramojn, por ŝparsi 0,60 eŭrojn por ĉiu senditaĵo. Sed la kvanto da donitaj informoj ne malkreskos, dank’ al uzo de pli malgrandaj litertipoj – cetere, necesis reenpaĝigi la jam pretigitajn paĝojn – jen alia motivo de malfruo. La kreskon de la poŝta tarifo, kiu tamen okazos (plus 0,70 eŭroj por unu numero sendita al eŭropaj adresoj), kompensas la malkresko de la eldonaj kostoj. Do, IKUE-kotizoj povas dum kelka tempo ne plikariĝi, sed ja oni devos alfronti la temon – ĉefe por ekstereŭropaj abonantoj.

Jen resume ĉio, por la momento. Bv. akcepti denove mian dankemon por Via ligiteco al EK: solvo por ĝia regula apero jam estis trovita. Ni esperas ne perdi Vian estimon.

Kore kaj frate,

Carlo Sarandrea



Letero de Benedikto la 16a al ĉiuj pastroj

LA JARO DE LA PASTRECO “Por esti paŝtistoj laŭ la Koro de Dio”

Anoncita la 16an de marto kaj malfermita la 19an de junio 2009 la Eklezio solenas la Jaron de la Pastreco ĝis la 11a de junio 2010, por akceli la sindevigon de interna renoviĝo de ĉiuj pastroj, por ilia forta kaj efika evangelia atesto en la hodiaŭa mondo. Tiun ĉi celon Benedikto la 16a esprimis en sia Letero, adresita al la “fratoj en la pastreco” kaj publikigita antaŭtage de la inaŭguro de la Jaro.

La Jaron volis la Papo koincide kun la 150a datreveno de la morto de sankta Johano Maria Vianney, la “sankta Paroĥestro de Ars”, patrono de la paroĥestroj, mortinta la 4an de aŭgusto 1859. Laŭ lia ekzemplo Benedikto la 16a, per sia letero, volas proponi al la pastroj de la tuta mondo simplan kaj konkretan itineron. La Papo substrekas antaŭ ĉio “la grandegan donacon, kiu la pastroj estas ne nur por la Eklezio, sed ankaŭ por la homaro mem”. Li memorigas la “apostolajn penadojn”, la “senlacan kaj kaŝitan servadon” kaj la karitaton de multaj pastroj, senkondiĉe dediĉitaj al servado al Dio kaj al la proksimumo”kvankam meze de malfacilaĵoj kaj nekomprenejoj”, foje meze de persekutoj “ĝis la supera atesto per la sango”. Li rimarkas, kun maldolĉeco, “ankaŭ situaciojn, neniam sufiĉe kondamnotaj, en kiuj la Eklezio mem suferas pro la malfideleco de kelkaj siaj servantoj. La mondo ĉerpas tial motivon de skandalo kaj de rifuzo”.

Poste la Papo indikas per simpleco la elementojn, kiuj igis sanktan Johanon Marian Vianney “paŝtisto laŭ la koro de Dio”: antaŭ ĉio li estis “humilega” viro sed samtempe “konscianta, ĉar pastro”, ke li estis por la siaj “unu el la plej valoraj donacoj de la dia mizerikordo”. “Li aspektis regata de senfina sento de respondeco”: “Se ni komprenus bone kio estas pastro sur la tero – li diris – ni mortus: ne pro timo, sed pro amo”. Li sciis, ke li estis vokita “enkarnigi la ĉeeston de Kristo, atestante Lian savodonan dolĉecon”.

“La unua afero por lerni - skribas Benedikto la 16a – estas la “kompleta identiĝo” de la Pastro de Ars kun sia paŝtista servado. “Oni certe ne devas forgesi – li aldonas – ke la esenca efiko de la paŝtista servado restas sendependa disde la sankteco de la paŝtista servanto; nek oni ne povas tamen forgesi la eksterordinaran fruktodonecon kiu estiĝas per la renkonto inter la efektiva sankteco de la servado kaj tiu subjekta de la servanto”. Tial, Vianney “regule vizitis la malsanulojn kaj la familiojn; aranĝis popolajn misiojn kaj paroĥajn festojn; li kolektis monon por siaj karitataj kaj misiistaj agadoj; li plibeligis sian preĝejon... li prizorgis

orfinojn, la instruadon de infanoj; li fondis kunfratarojn kaj vokis laikojn al kunlaboro”. “Lia ekzemplo – deklaras la Papo laŭ la 2a vatikana Koncilio – instigas min substreki la kunlaboro-sektorajn kiujn nepras pli kaj pli vastigi al la laikaj fideluloj, kun kiuj la pastroj konsistigas unusolan sacerdotan popolon”.

Benedikto la 16a memorigas, plie, la ĉiutagan ateston de la Paroĥestro de Ars: la preĝado fronte al la Tabernaklo, la Meso, la Konfespreno. “Li estis konvinkita pri tio, ke el la Meso dependas la tuta fervoro de la vivo de pastro”. “La motivo de la moleco de pastro – li diradis – estas, ke li ne donas atenton al la Meso! Mia Dio – li ekkriis – kiom priplorinda estas tiu pastro, kiu celebras kvazaŭ li farus ordinaran aferon!”.

La Papo instigas, poste, laŭ la ekzemplo de Vianney, havi “neelĉerpeblan konfidon je la sakramento de pentofaro” kaj “remeti ĝin je la centro de la paŝtistaj zorgadoj”. La sankta Paroĥestro restis en la konfesprenejo eĉ dum 16 horoj tage: li kuraĝigis la afliktitojn, li skuis la senentuziasmulojn, sukcesante “transformi la koron kaj la vivon de multaj personoj” ĉar li kapablis perceptigi “la mizerikordan amon de la Sinjoro”. Ars fariĝis “la granda hospitalo de la animoj”. “Granda missorto por ni paroĥestroj – li diris – estas, ke la animo maldiligentiĝas ĉar ĝi kutimiĝas “je la situacio de pekado aŭ indiferenteco” de multaj fideluloj. Pro tio li praktikis tre severan asketecon per maldormoj kaj fastadoj. Al pastro li klarigis tion jene: “Mi diros al vi mian recepton: mi donas al la pekuloj malgrandan pentofaron kaj la reston faras mi, anstataŭ ili”. “La animoj – rimarkigas la Papo – kostas la sangon de Jesuo kaj iu pastro ne povas ne dediĉi sin al ilia savo se tiu rifuzas persone partopreni en la

‘alta kosto’ de la elaĉeto”.


La Papo instigas la pastrojn, laŭ la spuroj de tiu sanktulo, vivi kiel Vianney la “novan vivostilon” inaŭguritan de Kristo, sekvante la tri evangeliajn konsilojn: malriĉeco, ĉasteco kaj obeemo, kiel “regula vojo de la kristana sanktiĝo”, praktikenda laŭ sia situacio. Ĉar li estis malriĉa, la Paroĥestro de Ars povis diri: “Mia sekreto estas simpla: doni ĉion kaj nenion konservi”. La ĉasteco “brilis en lia rigardo” kiam li sin turnis al la Tabernaklo “per la okuloj de enamiĝinto”. Kaj, komplete obeema, li deklaris: “Ne ekzistas du bonaj manieroj por servi Dion. Ekzistas nur unu maniero: servi Lin kiel Li volas esti servata”.

La Papo adresas al la pastroj “apartan inviton kapabli ekkapti la novan printempon, kiun la Spirito estigas dum nia epoko en la Eklezio, ne laste per la ekleziaj Movadoj kaj novaj Komunumoj”. La Papo sekve substrekas la neceson havi “kunulecon inter pastroj kaj la propra episkopo” en “sacerdota frateco efektiva kaj amema. Nur tiel – li klarigas – la pastroj kapablos travivi plene la donacon de fraŭleco kaj kapablos florigi kristanajn komunumojn en kiu reokazu la mirindaĵoj de la unua predikado”. Per la vortoj de Paŭlo la 6a, la Papo memorigas, ke “la nunepoka homo aŭskultas pli volonte la atestantojn ol la majstrojn, aŭ, se la homo aŭskultas la majstrojn, li tion faras ĉar ili estas atestantoj”.

Konfidante la Jaron de la Pastreco al la Virgulino Maria, la Papo finas sian leteron per jenaj vortoj: “Karaj pastroj, Kristo kalkulas je vi. Laŭ la modelo de la sankta Paroĥestro de Ars, lasu, ke Li konkeru vin kaj ankaŭ vi estos, en la hodiaŭa mondo, heroldoj de espero, de repaciĝo kaj de paco!”.

Vivo sub la rigardo de Dio

SANKTA JOHANO MARIA VIANNEY




Naskita la 8an de majo 1786 en Dardilly, apud Liono, filo de familio de terkultivantoj, Johano Maria Vianney havas sian infanecon markitan de la devoteco kaj amo de la gepatroj. La periodo de la franca revolucio multe influos lian junecon: li faros sian unuan konfesprenon surgenue ĉe la granda horloĝo en la salono de la naskiĝdomo, ne en la vilaĝa preĝejo, kaj li ricevos la unuan pekardonon el kaŝita pastro.

Du jarojn poste li ricevas la unuan komunion en grenejo, dum Meso en kaŝiteco celebrita de ribelanta pastro. Kiam li estas 17-jaraĝa li decidas respondi jes al la alvoko de Dio: «Mi deziras havigi animojn al la bona Dio», li diros al sia patrino, Marie Béluze. Lia patro, tamen, dum du jaroj kontraŭis ĉi tiun celon ĉar en la familio mankas laborantaj brakoj.

20-jaraĝa li komencas pretiĝi por la pastreco per la gvidado de abato Balley, paroĥestro de Écully. Malfacilaĵoj helpas lin kreski: li estas seminariano malriĉa ne nur pro manko de mono, sed ankaŭ de inteligenteco:

lia menso estas malgranda; li ne sukcesas lerni la latinan. Li devis realigi eksterordinaran klopodon por sekvi studadon kaj dufoje oni malaprobas lin ĉe la fina ekzameno. Liaj intelektaj mankoj zorgigas liajn superulojn: ĉu li povas pastrigi? Abato Balley, tamen, kapablos helpi lin ankaŭ dum tiuj jaroj, karakterizitaj de multaj elprovoj. Li pilgrimas al Louvesc, ĉe la tombo de sankta François Régis (1597-1640). Li devas fuĝi el deviga rekrutado, kiam oni volas varbi lin por batali dum la milito en Hispanio, kiun volis Napoleono kiu arestis Papon Pion la 7an. Fine, kiam li estas 30-jariĝa, li apenaŭ sukcesas transpasi la ekzamenon kaj li pastrigas. Rapide li transiras el senkuraĝiĝo al espero; Post pastrigo aŭguste de 1815 – kiam Napoleono estas mallibera en insulo sankta Helena - li fariĝas unue vikario en Écully.

En 1818 oni sendas lin al Ars. Tie li revekas la kredon de siaj paroĥanoj per predikado, sed ĉefe per la preĝado kaj vivostilo. Li sentas sin mizera fronte al la plenumenda misio, sed li lasas ke ĉirkaŭvolvu lin la Providenco de Dio. Li rebonigas kaj plibeligas la preĝejon. Li starigas orfejon kiun li nomas “La Providenco” kaj prizorgas la plej malriĉajn. «Oni ne scias kion la sankta Patro ne faris koncerne socialajn agadojn», skribis unu el liaj biografiistoj. Vidante en ĉiu el la gefratoj la ĉeeston de la Sinjoro, li zorgegis senpacience por asisti, helpi ilin kaj mildigi iliajn suferojn aŭ iliajn vundojn, por starigi



la kondiĉojn por ke ĉiu sentu sin libera kaj realigita. Aldone al la orfejo, li starigas lernejojn, li starigas agadojn por flegado de mizeruloj: nebnion li preterlasas. Li akompanis la familiojn kaj klopodas defendi ilin kontraŭ ĉio kio povas detrui ilin (alkoholismo, perforto, egoismo...). En sia vilaĝo li klopodas atenti la homojn laŭ ĉiuj aspektoj (humana, spirita, sociala). Pastro Vianney klopodis senĉese por ke ĉiu povu gustumi la ĝojon koni kaj ami Dion; por sciigi, ke Dio amas nin.

Atakita de multaj elprovoj kaj internaj luktoj, li konservas sian koron bone radikiĝinta en la amo al Dio kaj al la gefratoj. Lia unika zorgo estas la savo de la animoj. Liaj lecionoj pri katekismo kaj liaj predikoj parolas ĉefe pri la boneco kaj mizerikordo de Dio.

Li ne havis laŭtan voĉon kaj tiuepoke ja ne estis mikrofonoj; sekve, la fideluloj kiuj amasiĝis en la preĝejo kaj sur ĝia ŝtuparo ne sukcesis ofte aŭskulti lin. Kaj tamen la kronikoj raportas pri konvertiĝoj ankaŭ de tiuj, kiuj aŭskultis kelkajn frazojn, ne la tutan predikon. Kaj ankaŭ de personoj, kiuj nur vidis lin. En sia grava verko “La animo de ĉiu apostolado”, la benediktana patro Jean-Baptiste Chautard (1858-1935) rakontas ĉi tiun signifan eventon. Kontraŭklerikala advokato iris al Ars, esperante iom ridi koste de tiu “malklerea paroĥestro”. Sed li revenas hejmen konvertiĝinta. Al la amikoj kiuj demandas al li: “Entute, kion vi vidis en Ars?”, li respondis: “Mi vidis Dion en homo”: la ĉeeston de Dio oni povis vidi en sankta Johano Maria Vianney – ĝi estas la plej glorplena omaĝo, kiun oni povas fari al homa kreitaĵo.



Li estis pastro kiu konsumiĝis pro amo fronte al la Sanktega Eŭkaristio, kiu tute fordonis sin al Dio, al siaj paroĥanoj, al la pilgrimuloj.

Liaj longdaŭraj restadoj fronte al la tabernaklo estis vera intimeco kun Dio: kompleta sinallaso al lia volo, kun transfiguriĝinta vizaĝo: «Mi amas Vin, ho mia Dio, kaj mia sola deziro estas ami Vin ĝis la lasta spiro de mia vivo». Amikeco, kiu implicas reciprokecon, kiel du pecoj de vakso – klarigis pastro Vianney – kiujn, post kunfandiĝo, oni ne plu povas disigi nek distingi: «tiel okazas al nia animo kiam ni preĝas».

«Li estas tiel!» ekkriis la Pastro de Ars indikante la tabernaklon. «Nenio ekzistas pli granda ol la Eŭkaristio». Verŝajne, tio kio plej impresis lin estis

la konstato ke lia Dio estis tie, ĉeestanta por ni en la tabernaklo: «Li atendas nin!». La konsciigo pri la reala ĉeesto de Dio en la Sanktega Sakramento estis verŝajne unu el liaj pli grandaj gracoj kaj unu el liaj pli grandaj ĝojoj. Doni Dion al la homoj kaj la homojn al Dio: la eŭkaristia ofero fariĝis baldaŭ la kerno de liaj tagoj kaj de lia paŝtista agado.

Tio kio plej bone resumas tion, kio estis la sankta Pastro dum la 41 jaroj de lia ĉeesto en Ars estis la dezirego atingi sian savon kaj tiun de la aliaj, aparte de la paroĥanoj kaj de tiuj kiuj alvenis al li.

Tre rapide lia reputacio kiel konfesprenanto altiras al li multajn pilgrimulojn kiuj alvenas por trovi ĉe li la pardonon de Dio kaj la pacon de la koro. Ekde 1830 miloj da personoj atingis Ars por ricevi konfesprenon de li: pli ol 100.000 alvenos dum lia lasta vivojaro. Eĉ dum 16 horoj ĉiutage li restis en la konfesprenejo por repacigi la homojn kun Dio kaj inter ili. “Vera martiro de la konfesprenejo” diros pri li Johano Paŭlo la 2a. Ĉar li estis paroĥestro, Dio “postulos konton de mi pri tio”, li diradis. Li sciis, ke iam li mortos kiel “malliberulo de la konfesprenejo”.

Fronte al tia impona misio, trifoje li klopodis fuĝi el sia paroĥo, taksante sin malinda paroĥestro kaj opiniante esti pli barilo de la boneco de Dio ol vehiklo de lia Amo. La lasta fuĝo okazis preskaŭ 6 jaroj antaŭ la morto. Liaj paroĥanoj, kiuj reprenis lin, sonorigis la preĝejan sonorilon dum la nokto. Li sekve reiris al sia preĝejo kaj konfesprenis ĝis la unua matene. La postan tagon li diris: «mi kondukis kiel infano».

Li mortis la 4an de aŭgusto 1859, post esti fordoninta sin laŭ la ekstremaj pintoj de Amo. En la funebra rito partoprenis pli ol mil personoj, inter kiuj estis la episkopo kaj ĉiuj pastroj de la diocezo, alvenintaj por ĉirkaŭbraki tiun, kiu jam estis ilia modelo.

Beatproklamita la 8an de januaro 1905 de papo Pio la 10a, en la sama jaro li estis proklamita “patrono de la pastroj de Francio”. Pio la 11a sanktproklamis lin en 1925. En 1929 li estis proklamita “patrono de ĉiuj paroĥestroj de la mondo”. En 1959, en la 100a datreveno de lia morto, aperis la Encikliko de Beata Johano la 23a “Sacerdotii nostri primordia” pri li. Fine de la Jaro de la pastreco Benedikto la 16a proklamas lin “patrono de ĉiuj pastroj”. En 1958 en Esperanto aperis libreto: “La Sankta pastreto de Ars, Johano Vianney”.

Hodiaŭ Ars akceptas ĉiujare 450.000 pilgrimulojn kaj proponas multajn agadojn. En 1986 oni starigis seminarion por eduki la estontajn pastrojn laŭ la skolo de “Sinjoro Vianney”. Ĉar, kiel li mem diris: «kie pasas la sanktuloj, Dio pasas kun ili».

“POR GLOBALIZADO JE HOMA DIMENSIO”

la 3a encikliko de Benedikto la 16a

“La karitato en la vero, pri kiu Jesuo fariĝis atestanto” estas la ĉefa antaŭenpela forto por la vera tuteca evoluo de ĉiu persono kaj de la tuta homaro”. Entute, ĝi estas la gvidprincipo por doni novan vizaĝon al la globalizado. Tiel parolas “**Caritas in veritate**”, la tria encikliko de Benedikto la 16a, publikigita la **7an de julio 2009** “pri la tuteca homa evoluo”, adresita al la katolika mondo, sed ankaŭ “al ĉiuj bonavolaj homoj”. Per ĝi la Papo indikas novan direkton por la monda ekonomio antaŭvide al evoluo kiu akcelu la dignon de la persono.



Ĝenerala trarigardo pri la enhavo

Alvenis la tempo de nova planado-maniero por regi la globalizadon por ke ĉi lasta valorigu la hom-personon. Unu el la kernaj mesaĝoj de la tria encikliko de Benedikto la 16a estas ke la aganta krizo postulas rekonsideron de la ekonomia modelo nomata “okcidenta”. La dokumento entenas trarigadon laŭ pozitiva maniero de kuraĝigo al la homaro por ke ĝi povu trovi la rimedojn de vero kaj volo por superi la malfacilaĵojn.

La encikliko apartenas al la serio da socialaj enciklikoj de la papoj. Ĝi meditas pri la grandaj ŝanĝiĝoj okazintaj dum la lastaj jaroj. Unue, ĝi alfrontas la tiel nomatan “ideologion de la tekniko” kaj la plifortigon de la fenomenoj ligitaj kun la globalizado. Poste, la encikliko pritraktas la revenon de la religioj sur la mondan

scenon kaj fine ĝi analizas la temon pri la internaciaj leĝoj, normoj kaj regularoj. La encikliko deiras, aktualigante ĝin, el la mesaĝo pri kompleta homa evoluo, entenita en la encikliko “*Populorum Progressio*” de Papo Paŭlo la 6a, laŭ tri perspektivoj: la postulo de harmonio inter la konoj, la bezono de humanismo kiu estu malfermita al la Absoluto kaj fine la frateco por venki la motivojn de subevoluo. Entute “*Caritas in veritate*” volas esti lumo por la socio, kaj, por la kristanoj, ĝi volas redeklari la centrecon de la homo. Alivorte: la Eklezio inspiras, sed ne faras politikon. Laŭ “*Populorum Progressio*”, la encikliko de Benedikto la 16a denove klare diras: “La Eklezio ne havas teknikajn solvojn por proponi nek ĝi deziras iel miksi sin en la politikon de la ŝtatoj”. Tio ĉi implicas siavice ke

la sociala doktrino de la Eklezio ne estas “tria vojo”, nome, politika programo por realigi, cele al atingo de perfekta socio.

La sociala instruo de la Eklezio estas elemento de evangelizado, interalie ĉar oni ne povas limigi la homon nur je lia sociala vivo. En la encikliko oni emfazas ke ne povas esti vera progreso sen Dio kaj ke oni ne povas pritrakti socialajn temojn sen atenti la etikan temon.

La logiko de la sindono kaj de la senpageco estas la ŝlosilo de tiu frateco en kiu la Papo ekvidas la verajn solvojn de la tragikaj problemoj de la homa familio en la epoko de globalizado: nome, misekvilibroj kaj malsato, kultura kaj spirita aĉiĝo kiuj atencas kontraŭ la digno de la persono, viktimo de ekonomiaj dinamikoj pure utilo-celaj aŭ de ideologio laŭ kiu la tekniko havas senliman povon.

La krizo kiun prave la potenculoj de la tero hodiaŭ kontraŭbatalas, kaj kies plej malmolajn efikojn suferas la malriĉuloj, devas esti okazo por pli profunde vidi kiuj ni estas kaj kiaj ni devas esti – gefratoj vokataj ami kaj donaci – kaj kien ni devas iri, trans la blinda kaj fermita horizonto de la materio. Kontraŭe, globalizado ne estos ebleco de vivo, sed spiralo kaj

interplektiĝo de pli kaj pli dramoplenaj sklavecoj.

La unua kaj dua ĉapitroj

La Papo komence substrekas ke la Eklezio ne havas teknikajn solvojn por proponi; ĝi tamen havas mision de vero por plenumi favore al socio konforma kun la homo. La unua ĉapitro de la encikliko estas dediĉita al la mesaĝo de encikliko “*Populorum Progressio*” de Paŭlo la 6a. Sen Dio, ĝi admonas, oni rifuzas progreson, oni malhumanigas ĝin, kaj, per la vortoj de alia encikliko de Paŭlo la 6a, “*Humane Vitae*”, Benedikto la 16a akcentas la fortajn ligojn ekzistantajn inter etiko de la vivo kaj sociala etiko. “La motivoj de subevoluo – konstatas la Papo – ne estas unuarange el materia speco. Ili antaŭ ĉio baziĝas sur la volo, sur la penso kaj sur la manko de frateco inter la homoj kaj la popoloj. Pli kaj pli globalizata socio – atentigas la Papo - igas nin pli kaj pli proksimaj, sed ĝi ne igas nin gefratoj. Necesas sekve aktivi, por ke la ekonomio evoluu al plene homaj rezultoj.

En la dua ĉapitro la Papo pritraktas la homan evoluon dum nia epoko. Kaj li listigas multajn distordojn de la ekonomio: financa agado ĉefe spekulacia, migradaj fluoj ofte nur kaŭzigitaj sed poste malbone mastrumataj; kaj plie: la misa ekspluatado de la riĉo-fontoj de la mondo. Fronte al tiaj inter si plektitaj problemoj, la Papo alvokas al nova humanisma sintezo. La krizo, jen lia instigo, devigas nin reprojekti nian iradon. La progreso, konstatas la Papo, estas hodiaŭ plur-centra. “Kreskas la monda riĉeco tute strikte laŭ la vortoj, sed kreskas malegalecoj. Aliflanke, la internaciajn helpojn oni ofte deturnis el la origina celo, pro malrespondeca konduto



de donacantoj kaj ricevantoj. Samtempe ekzistas tro rigida uzo de la rajto je intelekta proprieto fare de la riĉaj landoj ĉefe en la sanitara sektoro.

Benedikto la 16a turnas poste la atenton al la vasta delokigo de malmultkostaj produktaĵoj. Ĉi tiuj procesoj – admonas la Papo – implicis la malkreskon de sociala sekureco por la laboristoj, kun gravaj riskoj por iliaj rajtoj. Al tio aldoniĝas la malkresko de la mono disponigita por la socialaj elspezoj, malkresko ofte realigata de internaciaj financaj institucioj, kaj la limigo de la sindikataj liberecoj. La Papo memorigas al la regantoj, ke la unua kapitalo, kiun oni devas valorigi estas la persono en ties integreco. Koncerne la mondon de kulturo, aperas novaj perspektivoj de dialogo sed staras ankaŭ duobla danĝero: kultura eklektikismo kaj unuformigo de vivostiloj. La Papo mencias, poste, la skandalon de malsato. Mankas, ĝi estas lia denunco, strukturado de ekonomiaj institucioj, kiu kapablu alfronti tiun urĝan problemon. Benedikto la 16a petdeziras la aliron al novaj horizontoj en la teknikoj de agrikulturo kaj la realigon de egaleca agrara reformo en la evoluontaj landoj.

La Papo deziras substreki ke la respekton por la vivo “oni tute ne povas dividi disde la progreso de la popoloj”. En diversaj mondopartoj, li atentigas, daŭras praktikoj por demografia kontrolo, kiuj eĉ altrudas abortigon. Krome, li aldonas, ekzistas bazohava suspekto ke foje la helpojn mem por la socia progreso oni



kunligas kun sanitaraĵ praktikoj kiuj implicas laŭfakte la kontrolon de la naskoj. Zorgigaj estas ankaŭ la leĝoj kiuj antaŭvidas eŭtanazion. Kiam socio sin turnas al la sufoko de la vivo, jen forta atentigo de la Papo, ĝi ne plu trovas motivojn nek energiojn por klopodi favore al la vera bono de la homo.

Alia aspekto ligita kun la progreso estas la religia libereco. La promocio de ateismo fare de multaj landoj, forprenas “spiritajn kaj humanajn rimedojn” el la progreso de la popoloj. La Papo sekve petdeziras ke la nuntempaj ekonomiaj elektoj daŭre havu kiel prioritatan celon la laboron por ĉiuj. Li avertas kontraŭ ekonomio kiu celas agi en mallonga kaj foje mallongega periodo. Kaj pri globalizado li finas la duan ĉapitron jene: “Sen la gvidado de la karitato en la vero, ĝi povas estigi pliajn dividojn”.

La tria kaj kvara ĉapitroj

Frateco, ekonomia evoluo kaj civila socio estas la temo de la tria ĉapitro de la encikliko, kiu komencas per laŭdo de la sindono. La memstareco disde “influoj el morala speco – rimarkigas la Papo – puŝis

la homon tro-uzi la ekonomian rimedon laŭ maniero eĉ detrua”. La evoluo, se ĝi volas esti aŭtentike homa, devas male lasi lokon al la principo pri senrekompenco aŭ donacemo (ekonomia teorio kiu starigas entreprenojn kiuj, kvankam celantaj esti efikaj kaj konkurencemaj, tamen transformas sian ekonomian vivon en lokon kaj rimedon de solidareco kaj kundivido).

La uzo de tia principo validas aparte por la merkato, kiu, redeklaras la Papo, ne povas kalkuli nur je si mem nek devas taksi la malriĉulojn balasto, sed male riĉo-fonto, pozitiva rimedo. La merkato ne devas fariĝi loko de superaltrudo de la fortulo sur la malfortulo. La nuntempa krizo, aldonas Benedikto la 16a, montras, ke la tradiciajn principojn de sociala etiko – travedebleco, honesteco kaj respondeco – oni ne povas preterlasi. Samtempe la Papo memorigas, ke ekonomiko ne eliminis la rolon de la Ŝtatoj kaj ke ĝi bezonas justajn leĝojn; pro tio li kuraĝigas civilizadon de ekonomio pere de solidarecaj ekonomiaj formoj.

La nuntempa krizo, notas la Papo, postulas ankaŭ “profundajn ŝanĝiĝojn” en la entreprenoj, kies mastrumado ne povas atenti nur la interesojn de la proprietuloj. Kaj la Papo prezentas novan pritakson pri la globalizado, kiun oni ne devas kompreni nur kiel “soci-ekonomia proceso”. “Ni ne devas esti ĝiaj viktimoj – instigas la Papo – sed ĝiaj roluloj, gvidataj de la karitato kaj de la vero. Al globalizado necesas kultura, laŭpersona kaj komunuma orientado, malfermita je la transcendo”. Ekzistas, li aldonas, la ebleco de granda redisdono de la riĉeco, sed la disvastigon de bonstato oni ne devas bremsi per egoismaj, protektismaj projektoj”.

En la kvara ĉapitro de la encikliko la Papo pritraktas la temon pri la progreso de la popoloj, rajtoj kaj devoj, naturmedio. Oni rimarkas, skribas la Papo, “la pretendon havi la rajton je superfluaĵoj en la riĉegaj socioj, dum mankas manĝaĵoj kaj akvo en difinitaj subevoluintaj regionoj”. La unuopaj rajtoj, ne ligitaj kun kunteksto de devoj, freneziĝas. Rajtoj kaj devoj, klarigas la Papo, resendatas al etika kunteksto. Registaroj kaj internaciaj organizaĵoj ne povas forgesi la objektecon de la rajtoj nek ilian ne-fordoneblecon. Ĉi-koncerne la Papo mencias la problemaron ligitan kun la demografia kresko. “Estas nelojale – li deklaras – taksi la kreskon de la loĝantaro kiel unuan motivon de subevoluo”. La Papo redeklaras ke oni ne povas limigi la seksecon je simpla hedonisma kaj luda aktivado”. Nek oni povas regli la seksecon per materiismaj politikoj el trudita planado de naskoj. “Male, instigas la Papo, la Ŝtatoj estas vokataj apliki politikojn kiuj akcelu la centrecon de la familio”.

La ekonomio bezonas etikon por ke ĝi korektu funkciu; ne temas pri iu ajn etiko, sed pri etiko amika de la persono. Tio validas ankaŭ koncerne la humanecajn intervenojn por la evoluo fare de la internacia kunlaborado, kiuj ĉiam devas kunaktivigi la alcelatojn. “La internaciaj



organizaĵoj – instigas la Papo – devus pridemandi sin pri la reala efiko de siaj burokrataj strukturoj”, ofte tro kostaj. Foje okazas, ke la malriĉuloj utilas por konservi malŝparemajn burokratajn organizaĵojn. El tio fontas la invito ke oni havu plenan travideblecon pri la ricevitaj monfondusoj. La lastaj paragrafoj de la 4a ĉapitro estas



dediĉitaj al la natur-medio, donaco de Dio kiun oni devas respondece uzi. En ĉi tiu parto de la encikliko la Papo parolas pri la problemaro de energio. “La akaparado de riĉofontoj fare de ŝtatoj kaj povogrupoj - denuncas la Papo - konsistigas gravan baron por la progreso de la malriĉaj popoloj”. La internacia komunumo devas trovi la instituciajn rimedojn por regli la eluzon de la nerenovigeblaj naturfontoj. La industriiĝintaj socioj, li aldonas, devas malkreskigi sian energiajn bezonojn, dum devas kreski la studo de alternativaj energioj. Entute, instigas la Papo, necesas efektiva ŝanĝo de pensomaniero, kiu instigu nin alpreni novajn vivostilojn.

La kvina ĉapitro

La kunlaboro de la homa familio konsistigas la kernon de la 5a ĉapitro. La kristana religio, atentigas la Papo, povas kontribui al la evoluo “nur se Dio trovas lokon ankaŭ en la publika sektoro”. Per la “forneo de la rajto povi publike konfesi sian religion” la politiko “alprenas subtretantan kaj agreseman

vizaĝon”. Kaj la Papo admonas: “Per laikismo kaj fundamentismo oni perdas la eblecon havi fruktodonan dialogon” inter kredo kaj racio. La Papo aludas sekve la principon pri “subsidiareco”¹, kiu proponas helpon al la persono pere de la mezaj strukturoj. Subsidiareco - li klarigas - “estas la plej efika antidoto kontraŭ ĉiu formo de asistismo laŭ bontrovo de la suvereno aŭ desupreca asistismo”. La internaciaj helpoj, fakte “povas foje teni popolon en situacio de dependo”, pro tio, petdeziras la Papo, oni devas liveri tiujn helpojn kunaktivigante la subjektojn de la civila socio. Sekve, la Papo instigas la riĉajn Ŝtatojn “alceligi pli da kvanto” de ilia interna brutta produktado favore al evoluo, respektante la alprenitajn sindevigojn. La Papo krome tre kondamnas la perversian fenomenon de la seksa turismado. “Doloriga estas la konstato – li rimarkas – ke tio ĉi okazas ofte per la konfirmo de la lokaj registaroj, per la silento de la landoj el kiuj venas la turistoj kaj per la kompliceo de multaj turismaj agantoj”.

Sekve, la Papo pritraktas la temon pri la migradoj. “Neniu lando per si mem – estas lia admono – povas taksii sin kapabla alfronti la migradajn fluojn”. Ĉiu migranto, li aldonas, “estas homa persono” kiu “posedas rajtojn respektendajn fare de ĉiuj kaj en ĉiu situacio”. Benedikto la 16a petas ke la fremdaj laborantoj ne estu taksataj kiel varo. Li petdeziras dignan laboron por ĉiuj kaj li invitas la sindikatojn turni la rigardon al la laborantoj de la landoj en kiuj oni malrespektas la socialajn rajtojn. La ekonomio, li rediras, “post ĝia malbona uzo” denove fariĝu rimedo celanta la evoluon. La Papo petas krome “reglamentadon de la sektoro” por doni garantiaĵojn al la pli malfortaj. La lasta paragrafo de la 5a ĉapitro estas dediĉita “al la urĝo reformi Unuiĝintajn Naciojn” kaj la “internacian ekonomian kaj finanĉan arkitekturon”. Necesas “la ĉeesto de vera monda politika Aŭtoritato”, kiu baziĝu sur la “principoj pri subsidiareco kaj solidareco”



kaj kiu ĝuu “faktan povon”. Kaj la ĉapitro finiĝas per alvoko starigi “superan nivelon de internacia ordo” por regi la globalizadon.

La sesa kaj lasta ĉapitro

La fina parto de la encikliko fokusiĝas sur la evoluo de la popoloj kaj

la tekniko. La Papo avertas kontraŭ la “aroganta pretendo” laŭ kiu “la homaro opinias, ke ĝi povas rekrei sin uzante la ‘mirindaĵojn’ de teknologio”. La tekniko, skribas la Papo, ne povas havi “absolutan liberecon”. Ĉefa sektoro en kiu okazas la kultura lukto inter la ideo pri absoluta rolo de teknikismo kaj la morala respondeco de la homo estas la sektoro de bioetiko - klarigas la Papo, kiu aldonas: “La racio sen la kredo estas destinita perdiĝi en la iluzion pri ĉiopoveco”. La sociala temaro fariĝas “antropologia temo”. La esploroj pri homaj embrioj, la klonado, jen bedaŭro de la Papo, “estas akcelataj de la nuna kulturo” kiu “kredas, ke ĝi malkaŝis ĉiun misteron”. Oni redeklaras

sekve ke “la evoluo devas impliki spiritan k r e s k o n , aldone al tiu materia”. Fine, la instigo de la Papo estas havi “novan koron” por “superi la materiisman konsideron pri la homaj eventoj”: li finas la enciklikon substrekante ke la evoluo bezonas “amon kaj pardonon,

mem-rezignemon, akcepton de la aliulo, justecon kaj pacon”.

1 — La principo pri subsidiareco estas politika kaj socia principo laŭ kiu pri necesa publika agado respondu la plej malgranda ento, kiu kapablas solvi mem la problemon. Tamen, kiam la problemo superas la kapablon de malgranda ento, tiam la supera ento devas anstataŭi la malgrandan, laŭ la limoj de la principo de subsidiareco (el *Wikipedia*)

La 19a Ekumena E-Kongreso

De sabato la 18a ĝis sabato la 25a de Julio okazis en Vroclavo (Pollando) la 19a Ekumena Esperanto-Kongreso, kiu estis samtempe la 62a IKUE-Kongreso kaj la 59a kongreso de KELI.

Vroclavo estas unu el la plej grandaj polaj urboj. Antaŭ la dua mondmilito ĝi estis germana do ĝia nomo estas: Wrocław en la pola, Breslau en la germana, Vratislav en la Ĉeĥa kaj Bratislavia en la itala (laŭ la legendo ĝi estis fondita de la ĉeĥa princo Vratislav kaj nomita laŭ lia nomo). La kongreso okazis en Alta Porpastra Seminario. La temo de la kongreso estis prenita el la Unua Epistolo de apostolo Paŭlo al la Korintanoj: "...fido, espero kaj amo, tiuj tri" kun la aldono "espero kristana aŭ monda senespero". Aliĝis 229 homoj. Dimanĉe matene oni celebris Sanktan Meson en la preĝejo de la Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo, kies paroĥestro estas la IKUEano sac. Stanisław Pawlaczek. La alikonfesiaj kristanoj havis sian apartan diservon en la luterana preĝejo de la Dia Providenco. Posttagmeze okazis la solena malfermo de la kongreso en la impona, baroka "Aula Leopoldina" de la Vroclava Universitato, kun la ĉeesto de reprezentantoj de la urbo, de la lokaj eklezioj kaj de la Silezia Esperanto-Asocio. Inter la solenaj paroladoj junaj violonistino kaj pianistino ludis agrablan klasikan muzikon. Vespere, en la kongresejo, s-ino Jadwiga Dzięgielewska fermis la tagon per kantkoncerto en E-o. Lundo komenciĝis je la sepa horo per la Meso, poste la antaŭtagmezo estis dediĉita al du prelegoj pri la kongresa temo. Unue prelegis la prezidanto de KELI, Philippe Cousson, pri la Espero, poste la prezidanto de TOLE, Boĵidar Leonov, pri Fido, Espero kaj Amo laŭ ortodoksa vidpunkto. Tagmeze ni piediris al la ortodoksa preĝejo de s-ktaj Cirilo kaj Metodio por la komuna preĝo. La posttagmezo estis disponigita al vizito de la urbo. La vespero komenciĝis en la grek-katolika preĝejo, kie pastro Bogdan Drozd kantis laŭtvoce siaj poeziaj kantoj, kaj finiĝis per nokta ŝipveturo sur la rivero. Ankaŭ mardo komenciĝis je la sepa horo per la s-cta Meso, poste okazis prelego de pastro Roman Forycki pri la temo: "Espero por la mondo laŭ vidpunkto de la papo Benedikto la 16a"; sekvis la prelego de prof. Endre Dudich pri: "Tero, ĉielo kaj espero – Geologio kaj teologio". La tagmeza preĝo okazis en la jezuita preĝejo de La Plej Sankta Nomo de Jesuo. Posttagmeze Prof. Endre Dudich prelegis pri "Ami kaj agi fidante – Albert Schweitzer kaj Patrino Tereza", sekvis orgenkonzerto en la luterana preĝejo de Dia Providenco. Vespere okazis recitalo de Paweł kaj Władysław Salik kaj Antoni Walaszek kun akompano de Wojciech Ławnikowicz. Merkrede okazis la kutima tuttaga ekskurso. Unue ni atingis Świdnican, kie ni vizitis la faman evangelianan lignan "Preĝejon de Paco", poste en la katolika katedralo okazis la Meso. Sekvis vizito al kastelo Książ, kaj, laste, la vizito de la kuraĉloko Szczawno Zdrój, kie, en la urba parko okazis koncerto honore al la kongresanoj. La ĵaŭda antaŭtagmezo estis dediĉita al la Ĝenerala Kunveno de IKUE kaj al la Jarkunveno de KELI. Posttagmeze, por la katolikoj, okazis Meso en la apuda katedralo. Je la fino de la meso kardinalo Henryk Gulbinowicz, emerita ĉefepiskopo de Vroclavo, bonvenigis nin kaj parolis favore de nia lingvo. Evangeliana Diservo okazis samtempe en la luterana preĝejo de s-ta Kristoforo. Vespere la franca kantisto-muzikisto-amuzisto JoMo entuziasme amuzigis nin per koncerto en dudeko da lingvoj. Vendredo komenciĝis je la sepa horo per la Meso. En la antaŭtagmezo prelegis Siegfried Krüger pri "Bonhoeffer kaj la Ekumeno", tuj poste prelegis Marija Belošević pri "Sankta Francisko: paco kaj bono" kaj fine la prezidanto de IKUE, Miloslav Šváček prezentis la pasintjarajn aranĝojn. La tagmeza preĝo okazis en la grek-katolika preĝejo de s-taj Vincento kaj Jakobo. La posttagmezo estis libera tempo por viziti la urbon kaj sin prepari por la adiaŭa vespero gvidata de Carlo Sarandrea. Sabaton matene post la Meso oni reveturis hejmen.

Giovanni Daminelli (el *Katolika Sento*)

PERSONE

Kardinalo Miroslav Vlk celebris la 19an de julio 2009 en la preĝejo de sankta Antonio la Granda, en Liberec (Ĉeĥio) Meson en E-o por la partoprenantoj en la Internacia Junulara Kongreso. Kuncelebris pastro Attila Szép el Hungarujo. Post la liturgio sekvis komuna tagmanĝo kun la reprezentantoj de la kongreso kaj de la paroĥo en la paroĥejo. Dum ĝi oni interparolis kun la kardinalo preskaŭ nur esperantlingve, kio al li kaŭzis iom da malfacilaĵoj precipe pro la simileco kun la de li aktive regata itala lingvo, tamen li kapablis bone respondadi, kvankam jam pli ol 40 jarojn li ne praktikadas la lingvon. (*informis Petr Adam Dohnálek*)

Pastro Duilio Magnani estis intervjuita de la E-elsendo de la Pola Radio. La intervjuo surondiĝis la 26a de junio 2009. Venontnumere ni publikigos la transskribon.



Pastro Erwin estas vicparoĥestro de paroĥo sankta Antonio el Padova, en Cassino (kie staras la fama abatejo de Montecassino, en Italio). Por la 76a itala Kongreso de E-o, okazinta de la 28a de aŭgusto ĝis la 3a de septembro 2009, li celebris Meson en E-o. Notindas, ke ĉi tiu pastro el Filipinoj ne parolis E-on, sed, fronte al paŝtista bezono, li ekzercis sin por la legado de la liturgiaj tekstoj kaj celebris la Meson elmontrante bonan regadon de la lingvo. La predikon li faris en la itala, kun samtempa traduko de Carlo Sarandrea, kio estis tre taŭga afero, ĉar la Meson partoprenis multaj neitalaj esperantistoj. (*informis Giovanni Daminelli*)

EN LA INTERRETO

En **YouTube**, ekde julio 2009 aperas filmoj kun la legado de la evangelia fragmento de la dimanĉa liturgio en E-o. Por vidi kaj aŭskulti, oni vizitu www.ueci.it, poste oni alklaku “Videoevangelio – Vidu”, plie: “YouTube” en la kadro de la fenestreto, por trovi aliajn tekstojn. La portalo plurlingva estas je la adreso: www.youtube.com/user/laparoladidio

IKUE dum la 94a UK de Esperanto 2009 en Bjalistoko

IKUE ĉeestis por la 3a fojo dum la “movada Foiro”, sabaton la 25an de julio, kune kun ĉ. 60 diversaj E-organizaĵoj. IKUE estis inter 4 asocioj kiuj ebligis al la vizitantoj rektan retan aliron al la oficiala paĝaro kaj oni disdonis informilojn kiuj abunde estis je dispono. La Meso en E-o okazis dimanĉe, ĉefcelebrata de la rektoro de la bjalistoka seminario Sac. Adam Skreczko kun Sac. Roman Forycki kiu predikis. Dum la Meso kantis la virina koruso “Kantylena”. Partoprenis eble inter 300 ĝis 350 personoj, inter kiuj estis ankaŭ la urbestro de Bjalistoko kun la edzino kaj pluraj bjalistokanoj ĉar oni vaste antaŭe diskonigis la informon pri la Meso. La tekston pretigis pastro Zielonka. Post ĝi okazis la Ekumena Diservo, gvidata de Sac. Forycki, kaj pastoroj Peter Baß kaj Krzysztof Maria Rózański. Aliĝis ortodoksa pastro, ne esperantisto. Ĉeestis ĉ. 150 kongresanoj. Tekstojn (legis esperantistoj el diversaj landoj) kaj kantojn elektis Marija Beloŝević. La tekstoj estis ankaŭ brailigitaj kaj sekve unu legajon legis blinda esperantistino el Italio. La Diservon muzike majstre akompanis Franz-Georg (orgeno) kaj Rita Rössler (fluto). Dum la kunveno de radio-aŭskultantoj (lundo) oni aŭskultigis mesaĝon de la redaktoro de la E-elsendo de RV. Dum la faka forumo (mardon) kun 50-o da personoj oni ĝenerale parolis pri la kunlaboro inter la fakaj asocioj. Kiel modelon de la kunlaboro inter FA, José Antonio Vergara, UEA-estrarano menciis la kunlaboron de IKUE kaj KELI. Marija parolis pri la spertoj dum la EEK. En la tradicia komuna kunsido de kristanaj esperantistoj partoprenis (ĵaŭdon) 60-o da kristanoj. Krome, en la Kongresa Libro, en la programo aperis la mencio pri la Meso kaj Ekumena Diservo kaj en aparta teksta parto ankaŭ priskribo. (*informis Marija Beloŝević, kiu cetere laboregis por la supre menciitaj eventoj*)

Ni funebras kaj kondolencas

S-ro Marcel COLLEU

landa reprezentanto de IKUE ekde 1995 ĝis duone de 2001 forpasis komence de 2009. Li lernis E-on en Dualo (Kamerunio) en 1956. Reveninte al Francio li gvidis multajn kursojn kaj kunaranĝis kongresojn. Lia longtempa loĝloko estis en Boves, sed lastajn jarojn li travivis en Le Perray-en-Yvelines. Biografio aperis en EK 9-10/1995.

Pastro Raphael MAWANDA

la 21an de januaro 2009 forpasis 54-jaraĝa ĉi tiu pastro de diocezo Masaka (Ugando). Li studis en la ĉefdomo de Cistercianoj en Romo. En 1998 dum somera helpado en paroĥo de urbo Treviso (Italio) li ekkontaktis E-on pere de nia DM d-ro Serio Boschin, lernis la lingvon kaj partoprenis en la kongreso de la itala sekcio de IKUE en 1999.

S-ro Maciej GRAJEK

de Toruń (Pollando), membro ĝis 2004, mortis la 6an de aprilo 2009.

D-ro Pietro DAO

Nia dumviva membro mortis 85-jaraĝa la 15an de aŭgusto 2009. Esperantisto ekde la 70aj jaroj de la 20a jc., li okazigis multajn E-kursojn kaj publikigis lernolibron. Ekde la 90aj jaroj li elpensis reformon de E-o, i.a. pro la tiama problemoj tajpi supersignojn en komputiloj: la koncerna reformo aperis libroforme kun la titolo "Esperanto2000". La rifuzoj kaj la admonoj ricevitaj fare de E-institucioj multe ĉagrenis lin. Ankaŭ pro la nekunlaboro de instruistoj li, kvankam malvolonte, disiĝis el la E-movado. Li poste multe pristudis kaj publikigis librojn pri aliaj lingvoj, kiel la okcitana kaj ladino.

S-rino Helga FARUKUOYE VOKAL

mortis 67-jaraĝa la 12an de julio 2009 post longdaŭra malsano. La entombigo okazis la 23an de julio en la viena tombejo Heiligenstätter Friedhof. Ekde 1979 ŝi estis DM.

*Ni memoru per nia preĝado ĉi tiujn niajn gefratojn.
Ke la Sinjoro bonvolu akcepti ilin inter siaj sanktuloj.*

RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC)

DIMANĈE - daŭro 9'20" - frekvencoj: MO 585,1530 kHz - KO 4005, 5885, 7250, 7435 kHz.
Satelite: Eutelsat 2 (13° E) transponder 54 (Bouquet Sky), vertikala polarizado, 11804 Mhz, aŭdkanalo E, 128 Kbit/s.

MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro 9' - frekvencoj: MO 1260, 1611 kHz - KO 6185, 7355 kHz.
Satelite: Eutelsat 2 (13° E), vertikala polarizado, frekvenco 11804 MHz, dua aŭdkanalo (TelePace), FEC 2/3, S.R. 27.500. **Oni povas aŭskulti ankaŭ per la Interreto:**

http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Granda arkivo:

<http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.

Skribu al:

RADIO VATIKANA - ESPERANTO
SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO
Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

FONDAĴO “EVIDENTE” INFORMAS (julio 2009)

Karaj gefratoj, mi havigas al vi kelke da ‘papiliaj’ informoj pri la projektoj sekve de iniciato iam esperantista, kiam en la jaro 1966 naskiĝis Agado E3 (*en la reto: http://www.esperokatolika.org/ek19661970/ek1966_11.htm#3, ndlr*), t.e. Esperantistoj Esperigas Esperantojn. La ideo estis laŭ la spirito de okulisto D-ro L.L. Zamenhof batali kontraŭ terura, kaj ankoraŭ ĉiam aktuala, problemo, nome la nenecesa vidhandikepeco de milionoj da homoj en landoj ekonomie malfortaj. Ĉi tiun jaron **2009** ni organizis 2 optikistajn misiojn en Rumanio (januare al Targu Mureș marte/aprile al Suceava) kaj 1 en Ukrainio (maje al la urboj Lviv kaj Ivano Frankivsk).

Nia lasta misio en Ukrainio, al kiu apud mi partoprenis 4 optikistoj kaj specialisto por homoj kun ekstreme reduktita vidpovo, okazis laŭ invito de Fondaĵo Henri Nouwen. Ni laboris en 2 teamoj. Mia teamo loĝis en monaĥejo de la Redemptoristoj, kie ni havis gastaman tegmenton. Dum nia ĉeesto ni konatiĝis kun 2 episkopoj, kiuj al ni sciigis ke pluraj pastroj de ilia kongregacio animzorge taskas en prizonoj. Ili eksplicite petegis nin reveni por servi per okulvitroj al centoj da malliberuloj. Verŝajne mi ne bezonas detale menciigi, ke ni vidis terurajn kondiĉojn en infanhejmoj kaj en ĉiaj institutoj kaj hospitaloj.

La samon ni konstatis en Kaliningrado, kiun urbon mi en novembro 2008 vizitis kun 2 optikistoj. Dum tiu periodo mi spertis multe da valora helpo flanke de esperantistoj. Nepre menciindas ke niaj fakuloj vidis tiom da operacieblaj pacientoj, ke la estraro de la Asocio por Nevidantoj urĝe petis al ni reveni venontfoje kun oftalmologoj, kiuj pretas helpi al precipe kataraktuloj. Mi ne povis kredi al miaj oreloj, kiam maljunaj homoj en hejmoj al mi konfesis: “Ni ne estas interesaj por okulistoj!”.

Tre kore mi dankas al tiuj karaj gefratoj, kiuj iniciatis reeldoni la belegan preĝareton de Jelly Koopmans-Schotanus “Preĝo por ĉiu tago”. Por esperantistoj tio estis instigo sponsori nian laboron. Al estontaj celoj apartenas i.a.: ebligi post-elementan instruadon por vidhandikapitaj infanoj en Albanio kaj, kio ege gravas kaj necesas, konstrui apartamentaron por blinduloj kaj iliaj familioj en Taĝikio.

Nune ni havas la financajn zorgojn pri entute 8 infanoj tute blindaj, t.e. 2 en Maroko, 2 en Rumanio kaj 4 en Kongolando. Al blindulino en Eritreo ni helpas pagante kurson pri angla lingvo, kio espereble kondukos al laborloko en lando kun alta senlaboreco. Por aŭtuno ĉi-jare ni preparas optikistan mision al Ruslando, se la burokratio ne malhelpos.

Al niaj grandaj sponsoroj apartenas la bonfarprojekta revendejo en mia loĝloko (en kiu mi volontulas), la urbestro de mia komunumo kaj nelaste la Nederlanda Fondaĵo por Vidhandikapuloj. “Evidente” estas bonŝanca kaj fiera, ke ĝi nun havas bonegan ambasadoron, kiu jam kelkfoje organizis por ni budon kadre de Optika Foiro. Kaj tio gvidis al fortega helpo en la formo de muntumoj, vitroj kaj mondonacoj.

Tre mi esperas - fakte jam ekde 1966 - ke ankaŭ ‘nia diligenta kolegaro’ en tiu ĉi ‘laboro paca’ ne laciĝos; jes, ĝis la nuna tago validas ke tri el kvar blinduloj estas tute senbezone vidhandikapitaj... Sufiĉas ke malfermiĝu niaj okuloj por vidi ilin kaj tiel vidigi ilin. Jesuo (Mat. 25) diris laŭ varianto: “MI estis blinda, kaj VI redonis al Mi vidpovon!”.

Multe dankas al ĉiuj helpopontoj kaj kore salutas **Jacques TUINDER**



Fondaĵo Evidente
Henegouwenlaan 35
NL-1966 RH HEEMSKERK
(Nederlando)
tel. +31 (0)251 231941.
ING Bank, konto 10.20.100
IBAN: NL20 INGB 0001 0201 00
BIC: INGBNL2A
E-poŝta adreso: Zienderogen@casema.nl

*Jacques Tuinder (centre, starante)
dum la optikista misio al Kaliningrad
(novembro 2008). Fronte al li, sidanta,
estas lia edzino Vera.*

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25€, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Se Via lando ne estas listigita ĉi tie, bonvolu kontakti rekte la Centran Oficejon de IKUE.

Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00€. Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50€, pagendaj al la KELI-kasisto.

Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1230 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Wapenplein 17 - 8 , B-8400 Oostende
Brazilo	Lejsester J. Flores Mirò, Seminário Paulino 8556, Via Raposo Tavares km 18,5, Jd Arpoador, BR-05576-200 São Paulo SP <i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília DF
Burundio	Jean Thomas Mishosi Birindwa, B.P. 781, Bujumbura
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjačeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Anne-Marie Chaney, 56 rue Corvisart, F-75013 Paris
Germanio	Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin
Hispanio	P. Manuel Casanoves, Nàpols, 346, 3r D, E-08025 Barcelona
Hungario	P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg
Italio	Giovanni Daminelli, Via Lombardia, 37, I-20099 Sesto S.Giovanni
Japanio	Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
Kongo	Jean Bosco Malanda Lutete, B.P 761, Kinshasa XI
Kroatio	Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Latvio	Jazeps Šlars, Zvaigžņu 20-26, 1009 Riga
Litovio	Adomas Mečislavas Grikpedis, A. Povilaičio 12-200, LT-2050 Vilnius
Nederlando	Simon Paul Smits, Deken Tomaslaan 32, NL-4453 AL 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Janina Trzpił, al. Wyszyńskiego 5F m 20, PL-21-560 Miedzyrzec Podlaski
Portugaliao	Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Ignatiu Orha, str. Odobescu Nr. 2, Ap. 34, R-4800 Baia Mare
Slovakio	Pavol Petrík, Na Dujave 3, SK-082 56 Pečovská Nová Ves
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501